# Ni Ĉiuj

**Revuo de Meksika Esperanto Federacio**

**Speciala numero 1/2011**

## *“LA INSTRUADO DE ESPERANTO EN MEKSIKO; MALFACILAĴOJ DEFIOJ KAJ PROPONOJ”*




**Prelegoj kaj prelegantoj**
**Labortabloj por instruistoj kaj aktivuloj**
**Teatro, muziko kaj Esperanto**

Cobeh'In

Meksika Esperanto Federacio

# *ANTAŬPAROLO*

Tiu ĉi speciala numero de “NI ĈIUJ” rilatas ĉefe al la aktivecoj planataj por la 11a Meksika Esperanto Kongreso (MEK), tiel ke ne nur la ĉeestantaj homoj partoprenu en ĝi, sed ankaŭ aliaj personoj, kiuj planis ĉeesti sed ne povos aŭ tiuj, kiuj, pro malproksimeco, laboro aŭ aliaj kialoj decidis ne veni. Sube vi povos legi kelkajn salutmesaĝojn de neĉeestantaj MEK partoprenantoj.

Septembre lastjare, la ĝenerala asembleo de Meksika Esperanto Federacio, decidis akcepti la proponon de la grupo Esperanto-GDL okazigi la kongreson en la urbo Guadalajara. La asembleo konsideris ke tiu grupo meritas havi la sidejon pro la konstanta laboro de siaj anoj, kiuj dum la lastaj monatoj okazigis plurajn renkontiĝojn, faris kursojn, partoprenis en internaciaj aranĝoj kaj klopodis disvastigi la lingvon en diversaj komunikiloj kiel en radio.

Ni kore dankas al Katharine Brownshire, Sara González Álvarez kaj Ulises Franco Pérez kiuj helpis en la konstruo de la nuna grupo Esperanto-GDL kaj al tiu ĉi lasta kune kun Edgar López Borja, kiuj daŭre laboras por la kresko kaj plibonigo de la Esperanto movado en tiu ĉi grava parto de Meksiko.

Elekti la temon de ĉiu kongreso ne estas hazarda afero, post cerbumado kion lasttempe la asocio atingis kaj sur kiuj kampoj ni ankoraŭ devas laboradi, MEF-estraranoj kaj kongresorganizantoj venis al "**La instruado de Esperanto en Meksiko; malfacilaĵoj, defioj kaj proponoj**" kiel ĉeftemo de nia kongreso.

Nia celo estas daŭrigi la laboron, kiu komenciĝis en 2008 en la Fakultato pri Lingvoj de la Universitato Aŭtonoma de Baja California (UABC) rilate al la oficiala enkonduko de Esperanto kaj la atingitaj rezultoj en aliaj edukaj institucioj de la lando.

Tiel Meksika Esperanto Federacio kaj la organiza teamo decidis kunigi fortojn por kundividi kaj interŝanĝi konojn, spertojn kaj alveni al konkludoj, kiuj povus impulsi la disvolvigon de la Esperanta movado en Meksiko.

La ĉefa temo donos la eblon labori samtempe pri subtemoj, kiuj havigos ilojn al la partoprenantoj per kiuj ili disvolvigos diversajn kapablojn kaj tiel ili povos kunlabori pli efike en la movado.

Kiel vi povos legi pli sube, preskaŭ ĉiuj prelegantoj estas junaj homoj, kiuj antaŭ relative malmulte da tempo lernis nian komunan lingvon sed kiuj, danke al ilia konstanta intereso kaj aktiveco en la movado, havas spertojn en la instruado de Esperanto. Ankaŭ akompanos nin usona, konata kaj sperta Esperantisto: profesoro Duncan Charters, kiu interesiĝas pri la monda Esperanta movado kaj volas kundividi kun la meksikanaro siajn konojn, spertojn kaj tiel kunfortigi la nacian movadon.

La kongreslogoo estis kreita de César Uribe González, lernanto de unu el la lastaj kursoj de Esperanto-GDL. En ĝi aperas la plej reprezenta statuo de Guadalajara: "La Minerva", sur la bildo oni povas klare observi la ligon inter la kongresurbo, la kongrestemo kaj Esperanto. Multan dankon al César pro la kunlaboro kaj la bela dezajno.

La serĉado de taŭga kongresejo ankaŭ postulis vizitadon de pluraj lokoj, kelkaj estis ne taŭgaj, aliaj multekostaj sed tiam telefonvokis al ni Leonardo Jáuregui Soto, ankaŭ ekslernanto en kurso de Esperanto GDL, kaj ofertis sian enterprenon por okazigi la 11a MEK. Post vizito al *"Cobeh In"*, nomo de la enterpreno, Edgar López, Ulises Pérez kaj Mallely Martínez ĝoje konkludis ke tiu estas la plej bona ejo; ĝi belas, estas bone ekipita… do ni igis ĝin "kongresejo de la 11a MEK". Leo, koran dankon pro la kunlaboro, pro malfermi la pordojn de via posedaĵo al la esperantistaro!

Kvankam ni publikis ke la kongreso estos inter la 16a kaj 18a de septembro 2011, la afero komenciĝos jam dum la 15a danke al la propono, kiun Mallely

Martínez Mateos kaj Martin Schäffer faris al Mirejo Grosjean, prezidanto de la Internacia Ekzamena Komisiono de UEA/ILEI, okazigi ekzamenojn pri Esperantaj konoj en Meksiko.

Aliteme, profitante ke mefanoj de diversaj partoj de la lando partoprenos en la 11a MEK, ni okazigos la jaran asembleon de Meksika Esperanto Federacio. En tiu ĉi dokumento vi trovos la kunvokon al ĝi Esperante kaj hispane.

Informojn pri la enhavo de la labortabloj por aktivuloj kaj instruistoj de Esperanto en tiu ĉi numero de NI ĈIUJ vi ankaŭ trovos. La unua celas integri la ankoraŭ ne tro aktivajn Esperantoparolantojn al la movado kaj igi ilin iel Esperantistoj. La dua celas ke, en tute amika etoso, la instruistoj de Esperanto interŝanĝu spertojn, ideojn kaj materialon. Ambaŭ labortabloj estos gvidataj de longjaraj Esperantistoj kaj spertuloj en la temoj: Duncan Charters kaj Martin Schäffer.

Kompreneble ne mankos la kulturaj aktivecoj: kiel la meksika festo kadre de la sendependiĝa tago de Meksiko, la teatraĵo aŭ koncertoj en kiuj ni havos la partoprenon de naciaj sed ankaŭ internaciaj artistoj kiel la franco JoMo kaj la polo Georgo Handzlik. Sendube tre grava estos la publika koncerto, kiu estos en la “Casa de la Cultura Jalisciense” danke al la apogo de la Ministerio pri Kulturo de la Registaro de Jalisco.

Kara leganto, mi invitas vin kunĝui la 11a MEK ne gravante kie vi troviĝos tiam. Ĉiel vi havos poste novaĵojn pri la rezultoj de tiu ĉi okazaĵo kaj eble venontjare vi havos la eblon ĉeesti en la 12a MEK.

***Mallely Martínez Mateos***

Prezidantino de Meksika Esperanto Federacio

## *ENHAVO*


| | |
|---|---|
| *ANTAŬPAROLO* | **2** |
| ***PRI GUADALAJARA KAJ LA KONGRESEJO*** | 6 |
| *SALUTMESAĜOJ DE DIVERSAJ ESPERANTISTOJ DE LA MONDO* | **8** |
| ***ĜENERALA PROGRAMO*** | 11 |
| *PRI PRELEGOJ KAJ PRELEGANTOJ* | **13** |
| ***KUNVOKO AL ĜENERALA ASEMBLEO DE MEF, 2011*** | 18 |
| *CONVOCATORIA A LA ASAMBLEA GENERAL DE LA FME, 2011* | **19** |
| ***EKZAMENSESIO DE UEA / ILEI*** | *20* |
| KREADO DE LA MEKSIKA SEKCIO DE ILEI | ***20*** |
| ***LABORTABLO POR INSTRUISTOJ DE ESPERANTO*** | 21 |
| *LABORTABLO POR AKTIVULOJ DE ESPERANTO* | **21** |
| ***LA DISTRA PROGRAMO*** | 22 |
| LIBROSERVO | **24** |

# PRI GUADALAJARA KAJ LA KONGRESEJO

En la okcidenta parto de Mekisko troviĝas la ŝtato Jalisco (Ĥalisco) (bildo 1), kies ĉefurbo estas Guadalajara (Guadalaĥara) (Bildo 2).




Bildo 1. Meksiko - Jalisco




Bildo 2. Jalisco - Guadalajara

Kulture, oni konsideras al “Guadalajara” kiel la plej emblema urbo de la lando, kiu monde donis la ikonografian bildon de Meksiko, ĉefe pro “*Los Mariachis*”, “*El Tequila*” kaj “*El Charro*”, tiu lasta estas la reprezenta figuro de la meksika popolo.

La urbo estas ankaŭ konata pro sia riĉa kaj bongusta gastronomio, sia arkitekturo, folkloro kaj religiaj tradicioj. En Meksiko, oni konas la urbon kiel “La Okcidenta Perlo” aŭ la “*Tapatía* Perlo”, oni nomas “*tapatío*” al tiu, kiu naskiĝis en la urbo Guadalajara.

La plej konataj turismaĵoj de Guadalajara estas: “Catedral Metropolitana” (Foto 1), Teatro Degollado”, “Plaza de Armas”, “Mercado Libertad”, “Rotonda de los Jaliscienses Ilustres”, inter aliaj. Pri turismaj informoj en la urbo, vi povas legi, Esperante kaj hispane, en la retpaĝo de MEF ĉe http://www.esperanto-mexico.org/eo/turismo/jalisco



*Foto 1 Catedral Metropolitana.*

La **sidejo** de la 11a MEK estos la instalaĵoj de la merkatika entrepreno **"Cobeh In"**, kiu troviĝas en unu el la plej belaj kvartaloj de la urbo: "Providencia", ĝi estas proksime de la plej reprezenta fonto de la urbo "La Minerva". La adreso estas:

Montreal #1051, inter Ostia kaj Nápoles


Col. Providencia.

**Kiel atingi la kongresejon per publika transporto?**

En la urbocentro, ekde la Katedralo de Guadalajara, iru suden sur Av. 16 de Septiembre ĝis Madero strato. Sur Madero prenu la buson "51c", kaj elbusiĝu en la angulo Av. López Mateos kaj strato José María Vigil, sur tiu ĉi lasta piediru tri stratojn okcidenten, kaj vi turnu dekstren sur Montreal, post bloko kaj duono vi trovos la Kongresejon. Notu bone: la veturado daŭros inter 35 kaj 40 min, dependante de la trafiko. Bv. iri al sekva ligo, kie vi trovos la vojon, kiun sekvas la aŭtobuso de la centro al kongresejo http://www.esperanto-mexico.org/files/Ruta%2051c.jpg

**Kiel atingi la kongresejon per aŭto aŭ taksio?**

Troviĝante enurbe, iru sur la avenuo López Mateos, preterpasu la "Minerva" kaj sekvu al la trafikcirklo nomata "Eulogio Parra" tie estas apoteko "Farmacia Guadalajara", benzinejo kaj aŭtvendejo "Chevrolet". Ankoraŭ pluiru 2 stratojn sur avenuo "Eulogio Parra", kiam vi venas al vendejo "OXXO" iru dekstren sur la strato Montreal ĝis vi trovu Cobeh In (Mapo 1).




Mapo 1. Lokiĝo de Cobeh In

## *SALUTMESAĜOJ DE ESPERANTISTOJ – ASOCIOJ DE LA MONDO*

- Dum la 1a Meksika Esperanto-Kongreso okazigita en la ĉefurbo en 1962, oni venis al la konkludo okazigi la 2an MEK en Guadalajara decembre 1963; kaj ties postkongreson ĉe la tiam belegaj ĉirkauaĵoj de "Lago de Chapala". Danke al la bona organizado -precipe kaj de S-ro. Alberto Gómez Cruz, de prof-ino Ma. Luisa Bacalari kaj de la LKK-, la Kongreso rezultis tre brila kaj fruktodona, ĝin partoprenis 40 kongresanoj. La Ŝtata Registaro favore apogis la organizantojn kaj metis je ilia dispono la "Casa de la Cultura Jalisciense". Nun septembre 2011, NI ĈIUJ ankaŭ devas nepre favore apogi la organizantojn kiel eble plej multe. Gratulon kaj sukceson al ili!. Tre TRE fervore salutas la 11an Meksikan Esperanto-Kongreson!!! **Fidel Figueroa Martínez**, KN 23 de la 2a Meksika E-Kongreso.

☺♥☺♥☺♥☺

- Sendube, la 11ª MEK en Guadalajara estos belega kaj fruktodona. Bedaŭrinde mi ne povos ĉeesti, sed mi sendas al vi la plej grandajn bondezirojn por la sukceso de tiu ĉi Kongreso. **Luis Raudón Uribe**, Akapulko, **Meksiko**.

☼☺☼☺☼☺☼

- Okaze de la 11a *Meksika Esperanto Kongreso mi deziras al ĉiuj organizantoj kaj partoprenantoj nurajn sukceson, ĝuon kaj multajn neforgeseblajn belajn impresojn. **Ronald Schindler**, prezidanto de Esperanto-Asocio Berlin-Brandenburgio.

☺♥☺♥☺♥☺

- Karaj kongresanoj!

Nome de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, mi deziras al vi tre sukcesan 11an Meksikan Esperanto-Kongreson en Guadalajara. Kiel ĝenerala kunveno de meksika Esperanto-movado, mi kredas, ke la kongreso estas aparte taŭga okazo por antaŭenigi la aliĝon de Meksika Esperanto-Junularo al TEJO, pri kio ni –la tutmonda junularo–, jam delonge esperas. **Łukasz Żebrowski,** prezidanto de TEJO.

☼☺☼☺☼☺☼

- Ĉar mi mem partoprenis en pluraj naciaj kaj internaciaj E-kongresoj diverslande, unu fojon ekstereŭrope, mi povas certigi vin ke la programo de la 11a MEK aspektas al mi tre interesa kaj bone pripensita, modele organizita. Bedaŭrinde, mi ne povos partopreni ĝin, sed mi estos kun vi tutkore pro diversaj kialoj:

1. La ĉeftemo koncernas ĉiun landon, kie Esperanto enradikiĝis kaj kie ĝi povas enradikiĝi, nun pli facile kaj rapide ol iam ajn. La retkursoj de "Lernu" atingas nun plejparton el la landoj monde: 240, do pli ol la 193 ŝtatoj ĉe UN. Ni ebligu la novulojn organiziĝi kaj uzi praktike la lingvon por celoj, kiuj aparte interesas ilin.
2. La partopreno de du konataj Esperanto-kantistoj —Georgo Handzlik kaj jOmO—, estas por mi ĝojiga. Des pli ĝojiga estas la partopreno de jOmO, el Francio, dank' al li, vi mem kaj la popolo de Meksiko povos konvinkiĝi, ke ekzistas pli simpatiaj, agrablaj, interesaj, talentaj kaj mense sanaj homoj en Francio ol ĝia ŝtatestro.
3. Pri la rilatoj inter Francio kaj Meksiko: la intereso de la popoloj de Francio, Meksiko kaj de iu ajn lando, kuŝas en konstruaj rilatoj, ne en revivigo de iamaj bedaŭrindaj kaj afliktigaj faktoj pri kiuj ili ne havas nun respondecon. Aprile 1958 dum la 51a Konferenco de la Aeronaŭtika Internacia Federacio, la prezidento de Usono, Dwight Eisenhower, diris ke "*la registaroj estas pli stultaj ol iliaj popoloj*" (Waringhien: "**Lingvo kaj vivo**", p. 422). Ni rememoru ke franca esperantisto, Anselmo Morin, kun la kuracisto Ambrosio Vargas, partoprenis en la unuaj paŝoj de Esperanto en Meksiko ekde 1903. Ni daŭrigu sur tiu vojo, kiun ili montris al ni. Esperanto faris siajn unuajn paŝojn ekde la sama jaro 1903 kaj en Meksiko kaj en la franca departemento Vendeo, ĉi tie dank' al arkitekto, en la urbo Luçon.
4. Inter vi certe troviĝas studentoj de UNAM, kiuj ricevas informojn disenditaj de mi dulingve en multaj landoj. Mi esperas, ke tiu kontribuaĵo konsistigas utilan helpon al la vivo de la E-movado en Meksiko. Sugestoj kaj rimarkoj estos bonvenaj.
5. La rolo kaj la valoro de virinoj kaj de Esperanto — ili estis same subtaksitaj kaj ankoraŭ nun subtaksataj en plejparto de la landoj de la mondo. Ambaŭ suferas

ankoraŭ je maljusta traktado, je antaŭjuĝoj. Sen subteno al la virinoj, la mondo pliprofundiĝados en malsekurecon, perforton, brutalecon kaj barbarecon. Unua Nobelpremiitino de Paco, Bertha von Suttner rekomendis instruadon de Esperanto en ĉiuj lernejoj de la mondo. Mi esperas, ke via prez. s-ino Mallely Martínez Mateos, ricevos viglan subtenon sine de la Federacio kaj la Kongreso.

**Henri Masson**, prezidanto de *Espéranto-Vendée* kaj kunaŭtoro de "La homo, kiu defiis Babelon"

☺♥☺♥☺♥☺

• Honore al la tutlanda meksika kongreso en septembro 2011. Altestimataj,

Jam delonge mi aŭdis pri via tre grava tutlanda kongreso. Mi gratulas kaj dankas la organizantojn. Mi gratulas ĉiujn, kiuj aliĝis kaj venis. Vi intencas pliboniĝi, plilertiĝi en la uzo kaj instruado de nia lingvo, gratulon pro tio!

Mi revidis aŭ ekkonis en Kopenhago gesamideanojn el Meksiko kaj povis ricevi tre bonan impreson pri ilia lingvonivelo, ĝeneralaj kapabloj kaj grandega motivigo por subteni nian movadon en Ameriko. Mi gratulas kaj dankas ilin. Konante unu la alian ni povos efike kunlabori kaj mi klopodos subteni vin laŭ miaj ebloj.

Kiel prezidanto de Internacia Ekzamena Komisiono mi zorgas pri Internacia Rajtigita Ekzamenantaro (IRE); nun staras en tiu grava listo Sinjoro Martin Schäffer, kaj mi esperas, ke baldaŭ aliaj personoj el via lando atingos tian altan nivelon por obteni permeson trapasigi ekzamenojn. Mi tre dankas, ke li kunlabore kun Sinjoro Duncan Charters el Usono prizorgas la ekzamensesion.

Por la nun komencanta kongreso mi deziras al vi interesajn prelegojn, fruktodonajn interparoladojn kaj valoran interŝanĝon de spertoj. Per tio certe ĉiuj progresos! Fartu bone!, Ĝuu esperanto-etoson! Elkore salutas **Mirejo Grosjean** el Svislando, prezidanto de Internacia Ekzamena Komisiono, de Svisa ILEI sekcio, komitatano A por Svislando ĉe UEA, kun-prezidanto de Svisa Esperanto Societo.

☼☺☼☺☼☺☼

## *ĜENERALA PROGRAMO*[1]

**Laŭtaga Programo**

**Ĵaŭdo, 15an de septembro**

16:00 – 20:00h. Gramatika kaj skriba ekzamenoj ILEI-UEA

17:00 – 19:00h. Akcepto de partoprenantoj

**Vendredo, 16an de septembro**

09:00 – 10:00h. Akcepto de partoprenantoj / Libroservo

10:00 – 11:00h. Solena malfermo / Libroservo

11:00 – 11:45h. Prelego **1**: "La propedeŭtika valoro de Esperanto"
David López Rueda

11:00 – 11:45h. Prelego **2**: "Instruado de Esperanto en Meksiko"
Daniel Moreno Martínez

11:45 – 12:30h. Prelego **3**: "Modernaj teknologioj por Esperanto-lernado"
Duncan Charters

12:30 – 13:30h. Kurso por komencantoj / Carlos Fernando Hernández Loarca

12:30 – 13:30h. Kurso por komencintoj / Daniel Moreno Martínez

12:30 – 13:30h. Kurso por instruistoj / Duncan Charters - Martin Schäffer

12:30 – 13:30h. Libroservo

13:30 – 15:30h. Tagmanĝo

15:30 – 16:15h. Kreado de meksika sekcio de ILEI

16:15 – 17:00h. Prelego **4**: "Lerni Esperanton por lerni aliajn lingvojn; lerni aliajn lingvojn por lerni Esperanton"
Juan Mario Morales De la Torre

16:15 – 17:00h. Prelego **5**: "Planado-organizado de ĉeestantaj kursoj"

[1] Ekstre la ĉeestantaj partoprenantoj ricevos grafikan programon.

Edgar Noel López Borja

17:00 – 19:00h. Ĝenerala Asembleo de Meksika Esperanto Federacio

19:00 – 19:30h. Diversaj prononcoj en Esperanto / Duncan Charters

20:00 – Meksika festo

**Sabato, 17an de septembro**

09:30 – 10:15h. Prelego **6**: "Kreado de didaktika materialo por la instruado de Esperanto"

Sergio Eduardo Romero Aldana

09:30 – 10:15h. Prelego **7**: "Kiel faciligi (mem)lernadon de Esperanto? Propra sperto"

Manuel García Jurado Taracena

10:20 – 11:40h. Teatraĵo "Ludoviko Lazaro" / Georgo Handzlik

12:00 – 13:00h. Labortablo por instruistoj de Esperanto, parto 1 / Duncan Charters

12:00 – 13:00h. Kiel disvastigi Esperanton? Parto 1 / Martin Schäffer

13:00 – 13:20h. Kafpaŭzo / Libroservo

13:20 – 14:20h. Labortablo por instruistoj de Esperanto, parto 2 / Duncan Charters

13:20 – 14:20h. Kiel disvastigi Esperanton? Parto 2 / Martin Schäffer

14:20 – 16:30h. Tagmanĝo

16:30 – 20:00h. Kultura Vespero

**Dimanĉo, 18an de septembro**

09:00 – 10:00h. Solena fermo

09:00 – Ekskurso

10:00 – 12:00h. Parola ekzameno ILEI-UEA / Libroservo

## *PRI PRELEGOJ KAJ PRELEGANTOJ*

En tiu ĉi parto vi trovos informojn pri la prezentotaj prelegoj kaj prelegantoj en la 11a MEK, tiel ke vi jam antaŭe havu ideon kion oni trovos en ĉiu prezentado. La ordo estas alfabete laŭ la familia nomo de la prelegantoj.

★ ★ ★

**Prelego #3: "Modernaj teknologioj por Esperanto-lernado"**

***CHARTERS*** Duncan diplomiĝis en la angla Universitato de Kembriĝo, kie li aktivis en ĝia Esperanto-grupo, kaj poste doktoriĝis pri la hispana lingvo kaj literaturo en la Universitato de Indiana. Li instruis la hispanan, Esperanton, kaj metodojn instrui lingvojn en pluraj usonaj universitatoj, ekde 1974 en Principia College en la ŝtato Ilinojso, kie li estas fakultatestro pri lingvoj kaj kulturoj kaj katedra profesoro pri humanismaj studoj. Li estis prezidanto kaj de la Internacia Ekzamena Komisiono de UEA-ILEI kaj de ILEI mem, kaj nun servas kiel ĝia vicprezidanto kaj estrarano pri universitata agado.

***Resumo***: La unua apliko de teknologio al lingvolernado okazis jam en 1900. Kiel evoluis la uzado de teknologio por subteni lingvoakiradon post tiu mejloŝtono, kaj kial gravas? Ĉu la teknologio povas vere helpi por lerni lingvojn, kiuj uzoj estas plej efikaj, kaj kio estas disponebla kaj rekomendinda por la instruado de Esperanto? Kiajn aparatojn ni povas utiligi, kiujn materialojn kaj programojn, kiujn retejojn?

★ ★ ★

**Prelego #7: "Kiel faciligi (mem)lernadon de Esperanto? Propra sperto"**

***GARCÍA JURADO TARACENA* Manuel** naskiĝis en Meksikurbo en 1985 kaj kreskis en Cancún. Li studas fizikon je doktornivelo en Monterrey, kie li nun loĝas. Li estas publikiginta rakontojn kaj poemojn en literaturrevuoj, kolumnojn de scienca popularigo en ĵurnaloj kaj teĥnikajn artikolojn en akademirevuoj. Li eklernis la Internacian Lingvon en 2007 kaj estas aktiva ekde 2009. Li prizorgas esperantan tradukon de "Muerte en la rúa Augusta" far Tedi López Mills kaj "La casa pierde" far Juan Villoro, ambaŭ verkoj ricevis la premion Xavier Villaurrutia en 2009 kaj 1999 respektive.

***Resumo:*** Kial (mem)lerni Esperanton? Ĉu oni elstarigu kian ajn ideologian superecon? Ĉu oni reklamu eblecon malmultekoste vojaĝi? Ĉu oni prezentu ĝin kiel avantaĝa mensa defio? Kiel lerni ĝin? Ĉu en la reto, en kluboj aŭ per studado de metodo?. La sukceso de (mem)lernado grave dependas je la respondo al tiuj ĉi demandoj. La preleganto eldiros sian vidpunkton pri tiuj ĉi aferoj laŭ siaj propraj travivaĵoj. Lia celo estas montri ke pli facilas interesigi universitatajn dudek-jarulojn pri Esperanto se ni montras ĝin kiel ebligilo, ol artefarita lingvo, ĉar tiamaniere la Internacia ne konkuras kontraŭ aliaj "pli tradiciaj" lingvoj”.

★ ★ ★

**Prelego #5: "Planado-organizado de ĉeestantaj kursoj"**

***LÓPEZ BORJA* Edgar Noel** naskiĝis en *Azcapotzalco* (Azkapotzalko) Meksikurbo en 1987, li estas studento pri Biologio en la Universitato de *Guadalajara*. Li esperantiĝis en 2009, li estas aktiva partoprenanto de la klubo Esperanto GDL, ĉeestis en la 43a ILEI-Koferenco, en la 95a UK kaj en la 66a IJK okazintaj lastjare en Kubo. Ekde 2010 li instruas Esperanton al plenkreskuloj.

***Resumo***: Ĝenerale la sukceso de la instruado kaj lernado dependas ĉefe de la planado de niaj kursoj. Bona planado-organizo donos certecon al la lernantoj sed precipe lertecon kaj memfidon al la instruisto. Dum la planado nepras atenti pri la daŭro de la kurso, kvanto da lecionoj, fiksi horaron, kontroli kvanton da lernantoj kaj defini la celgrupon: ĉu por infanoj aŭ por plenkreskuloj, ĉu por komencantoj aŭ por komencintoj. Multe gravas ankaŭ la elektita lernomaterialo, la instruiloj kaj la instruaj metodoj. Kaj dum la organizo nepras pensi pri la taŭga lernejo aŭ klasĉambro, divastigo de la kurso, akiro de la lernomaterialoj, kaj fiksi kotizon por ke la partoprenantoj taksu la gravon de la kurso.

★ ★ ★

**Prelego #1: "La propedeŭtika valoro de Esperanto"**

***LÓPEZ RUEDA* David** naskiĝis en la urbo de San Luis Potosí en 1986. Li finis siajn universitatajn studojn pri edukado pri fremdaj lingvoj kaj laboras kiel instruisto pri la angla lingvo. Li esperantiĝis en 2007 kaj ekde tiam li partoprenas diversajn naciajn kaj internaciajn Esperantistajn renkontiĝojn. En la jaro 2008 li estis elektita kiel estrarano de Meksika Esperanto Federacio.

***Resumo:*** Ĉiuj lingvoj estas propedeŭtikaj, oni scias ke lerni unuan lingvon estas ĉiam pli malfacila ol lerni duan kaj eĉ ol lerni trian lingvon. Sed, kio okazas kiam la unua lingvo lernita kiel fremda lingvo estas fakte internacia lingvo? Dank'al la karaktero de ties relative simpla strukturo, de ties klareco, de ties reguleco gramatika kaj ties facileco por esti analizata, Esperanto estis uzata de diversaj spertuloj tra la mondo por eksperimenti kaj havigi interesegajn konkludojn rilate al la ligo inter la enkonduka lernado de la Internacia Lingvo kaj ties efektoj sur la lernado pri aliaj lingvoj. La celo de la preleganto estas levi la demandon en kunteksto pli proksima al Meksiko kaj al nia kontinento.

★ ★ ★

**Prelego #4: "Lerni Esperanton por lerni aliajn lingvojn, lerni aliajn lingvojn por lerni espernanton”**

**Juan Mario Morales de la Torre** estas meksikano, kiu naskiĝis en 1983, li estas sociologo, psikologo, geografo kaj socia esploristo. Lia esperantiĝo okazis en 2007 kiam li partoprenis ĉeestantan kurson en la Universitato Nacia Aŭtonoma de Meksiko (UNAM). Krom Esperanton kaj hispanan, li scipovas la anglan, francan, portugalan kaj meksikan signolingvon, li havas konojn ankaŭ pri la itala, germana, rusa, ĉina, naŭatla kaj araba. Liaj ĉefaj interesoj estas la lernado de lingvoj kaj kono de diversaj kulturoj ĉefe dum vojaĝoj.

***Resumo:*** Esperanto estas artefarita lingvo, kiu havas multajn malsamajn radikojn precipe latinidajn, germanajn kaj, je malplia grado, de aliaj lingvoj. Por disvolvi memfaritan metodon, la unua tasko estis rekoni radikojn de esperantaj vortoj similaj al tiuj de lingvoj, kiujn la preleganto jam sciis antaŭ ol eklerni Esperanton. Post la lernado de la “internacia lingvo”, li eklernis aliajn lingvojn kaj sekvis la malkovron de novaj radikoj ekzistantaj ankaŭ en Esperanto tial, uzante la esperantan lingvon kaj strukturon, la preleganto komencis fari vortlistojn, frazojn kaj bildajn skemojn por lerni la postajn lingvojn. Kelkaj aliaj lernmetodoj devis esti samtempe inkluzivitaj ekzemple; sama teksto, tradukkomparo – sintakso, rearanĝo de fizikaj spacoj por veki la vidan stimulon, uzo de utila materialo trovita en la reto, ktp. La ĉefa celo de la prelego estas montri manierojn por ke la publiko mem povu disvolvi sian propran lernmetodon.

**Prelego #2: "Instruado de Esperanto en Meksiko"**

***MORENO MARTINEZ* Daniel** naskiĝis en Meksikurbo. Li estas inĝeniero pri metalurgio kaj nuntempe sin formas kiel magistron pri sciencoj. Li lernis esperanton en 2004 kaj ekde 2007 li instruis la internacian lingvon en diversaj ejoj, kiel en la Jura kaj en la Ĥemia Fakultatoj de UNAM. En 2008 li estis elektata kiel ĝenerala sekretario de Meksika Esperanto Federacio.

***Resumo***: Instruistoj de la Lingvo Internacia en Meksiko konsentas ke ja malfacilas instruado de tia lingvo en lando kie la lingvistika problemo ne estas klara kaj bone komprenata, vojaĝrimedoj de loĝantoj kutime ne sufiĉas kaj krome lernokapablo kaj entuziasmo de la gelernantaro facile kaj rapide malaperas. Kion fari en tia ĉi situacio? Ĉu Esperanto ne sukcesos en Meksiko aŭ latinamerikaj landoj? Ĉu niaj klopodoj ne trovos bonan finon? Certe sukcesi estas malfacila sed ebla.

★ ★ ★

**Prelego #6: "Kreado de didaktika materialo por la instruado de Esperanto"**

***ROMERO ALDANA* Sergio** naskiĝis en Meksikurbo en 1987. Li studis lingvistikon kaj hispanlingvan literaturon, ekde 2010 li laboras kiel instruisto de la portugala en la Universitato Aŭtonoma de Querétaro (UAQ). Li esperantiĝis en 2006, ekde 2009 estas membro de Meksika Esperanta Federacio. Ankoraŭ ne formale, ekde 2010 li instruas Esperanton en la Fakultato pri lingvoj de UAQ.

***Resumo:*** La instrua materialo estas inter la nepraj bezonoj de la instruistoj de Esperanto. Tia materialo ne estas nur luksa aldonaĵo, sed grava parto de la Esperanta klaso. Per ĝi oni povas klarigi kaj ekzempli la konceptojn kiuj, alie, povas resti malklaraj aŭ malbone komprenataj. Instruaj materialoj aldonas multe da simpleco al tasko klare instrui la Internacian Lingvon. Kreado de instrua materialo estas utila kapablo por ĉiu instruisto.

# *KUNVOKO AL ĜENERALA ASEMBLEO DE MEKSIKA ESPERANTO FEDERACIO, 2011*

**MEKSIKA ESPERANTO-FEDERACIO** invitas ĉiujn siajn anojn al asembleo, kiu okazos la 16an de septembro 2011 je la 17a horo, en la enterpreno "*Cobeh In*" kiu troviĝas en Montreal 1051, Col. Providencia, Guadalajara, Jalisco. CP. 44630. La asembleo okazos laŭ la prezentata:

**Tagordo:**

1.- Malfermo kaj listo de anoj ĉeestantaj kaj aprobo de la tagordo.

2.- Estrara jara raporto.

3.- Ĝeneralaj aferoj:

a).- Laborplano.

b).- Esploro pri la sidejo de la venonta nacia kongreso.

c).- Informo pri kunvoko por kandidatiĝi, je 2012 estos elekto por formi la novan estraron de MEF por la periodo 2012 – 2016.

Meksikurbo, je la 1a de septembro 2011.




Mallely Martínez Mateos

Prezidantino de Meksika Esperanto Federacio

# *CONVOCATORIA A LA ASAMBLEA GENERAL DE LA FEDERACIÓN MEXICANA DE ESPERANTO, A.C. 2011*

LA FEDERACIÓN MEXICANA DE ESPERANTO, ASOCIACIÓN CIVIL, convoca a todos los asociados a la asamblea general que se celebrará el día 16 de septiembre de 2011, a las 17:00 horas, en la empresa “*Cobeh In*” que se encuentra en Montreal 1051, Col. Providencia, Guadalajara, Jalisco. CP. 44630. La asamblea se sujetará a la siguiente:

**Orden del día:**

1.- Inauguración, lista de presente de los asociados y aprobación de la orden del día.

2.- Reporte anual de la directiva.

3.- Asuntos generales:

a).- Plan de trabajo.

b).- Exploración de la sede del próximo congreso nacional.

c).- Información sobre la convocatoria para participar como candidato, ya que en 2012 habrá elecciones para formar la nueva directiva de FME para el período 2012 – 2016.

México, D.F., a 1 de septiembre de 2011.

01.09.2011

Mallely Martínez Mateos

Presidenta de la Federación Mexicana de Esperanto, A.C.

## *EKZAMENSESIO DE UEA / ILEI*

Kiel unua fojo dum la historio de la meksika Esperanta movado, dum la nacia kongreso ni okazigos ekzamensesion danke al la kunlaboro de la Internacia Ekzamena Komisiono de UEA-ILEI kaj Meksika Esperanto Federacio.

Ni petas la kandidatojn alveni 15 minutoj antaŭ la 16a horo al la salono "Zamenhof" de la kongresejo por kontroli vian identigilon kaj klarigi al vi pri kiel la sesio okazos.

Gravas antaŭinformi ke nur tiuj, kiuj sukcesos la gramatikan parton rajtos fari la skriban kaj kiuj trapasos tiun lastan rajtos fari la parolan ekzamenon.

La parola ekzameno okazos je la 18a de septembro matene, la ĉestantaj ekzamenantoj informos je kioma horo estos la vico de ĉiu kandidato.

Bv. kunporti nur skribilojn, nenio plu estos necesa! SUKCESON!

## KREADO DE LA MEKSIKA SEKCIO DE ILEI

Dum la 44a ILEI-konferenco okazinta ĉijare en Kopenhago, la komitato de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj akceptis meksikan ILEI-sekcion, sub la kondiĉo ke ĝi reale fondiĝos dum nia Meksika Kongreso de Esperanto. ILEI estas la tutmonda organizaĵo por instruistoj, ĉu de Esperanto, ĉu de aliaj temoj. Dum la programero de la 11a MEK ni do traktos la fondon de la Meksika Sekcio de ILEI kaj petas vian partoprenon kaj kunlaboron.

## *LABORTABLO POR INSTRUISTOJ DE ESPERANTO*



Kiuj havis spertojn iam ajn en la instruado de Esperanto certe scias ke, de komence, ne estas tute facila tasko. Kiel ni aŭdos en la prelego de Edgar Noel López Borja, la sukceso de ĉiu kurso dependas de pluraj faktoroj. La plej multo de la instruistoj de Esperanto ne lernis kiel iĝi instruisto en tiu fako, kiel okazas en aliaj lingvoj, ekz. en la angla, franca, itala, ktp. Do la lernado “kiel iĝi instruisto” de Esperanto ofte okazas survoje, en la praktiko.

La labortablo celas ĉefe intersanĝi spertojn, proponojn kaj materialojn inter la partoprenantoj. La gvidanto de tiu ĉi labortablo estos la rekona Esperantisto Duncan Charters el Usono. Charters petas la partoprenontinstruistojn kunporti materialon: ludojn, lernolibrojn, bildojn, ktp., kiujn ili uzas en la instruado de Esperanto, ne gravas por kiu nivelo aŭ celgrupo.

Notu bone! Tiuj, kiuj kunportos siajn instruilojn por labori / montri, ricevos donace libron en Esperanto, la libroj estis donacitaj de nia kara Inĝ. Fildel Figueroa M. por niaj viglaj kunlaborantoj. Bonvenon al nia labortablo!

## *LABORTABLO POR AKTIVULOJ DE ESPERANTO*

La temo de tiu ĉi labortablo estas “Kiel disvastigi Esperanton? Parto de la enhavo estis prezentita lastjare en Kubo dum la 43a ILEI-Konferenco en Matanzas. La celo tiam estis, kaj nun estas, montri al partoprenantoj kiel plej bone informi pri Esperanto kaj disvastigi la lingvon en diversaj medioj ekster Esperantujo. La labortablo estos gvidata de Martin Schäffer kaj ĝi estas bona eblo por tiuj, kiuj ne partoprenos en la labortablo por instruistoj. Ekenmiksiĝu en la movado! Partoprenu!

## LA DISTRA PROGRAMO



### *TEATRAĴO "LUDOVIKO-LAZARO"*

Aktoras: Georgo Handzlik el Polando (Foto 2)



*Foto 2. Georgo Handzlik*

La monodramon pri la vivo de Ludoviko Lazaro, Handzlik skribis laŭ mendo de urbo Bjalistoko por prezenti ĝin dum la 94-a UK en tiu urbo, kie okazis la premiero. La spektaklon reĝisoris *Kuba Abrahamowicz*, profesiulo, aktoro, kaj instruisto en Ŝtata Teatra Altlernejo en Krakovo. La teksto estis verkita originale en Esperanto kaj poste preparita ankaŭ la pola versio. Tiel ekde 2007, Handzlik prezentis sian teatraĵon en diversaj urboj de Pollando kaj en aliaj landoj de Eŭropo; Ĉeĥio, Francio, Hispanio, Hungario, Italio, Slovakio, Svedio kaj Svislando. En Ameriko li aktoris en Brazilo kaj nun ni havos la bonŝancon havi lin en Meksiko.

### *MEKSIKA FESTO*



Karaj esperantoparolantoj de Meksiko kaj la mondo, vi ĉiuj estas kore kaj amike invitataj al la "meksika festo", kiu kadre de la 201a datreveno de la sendependiĝo de Meksiko, okazos la venontan 16an de septembro en la kongresejo de la 11a MEK ekde la 20a horo. Ni tiam invitos al nia amiko Georgo kanti por ni! Samtempe ni festos la naskiĝtagon de Manuel García, Leonardo Jáuregui, Gabriela Reyes kaj Sergio Romero. Bv. kunporti trinkaĵojn, manĝaĵojn / manĝaĵetojn (garnachas / botana) krom muzikon. Ni ankaŭ invitas vin vesti ajnan tipan meksikan vestaĵon! Ni ĉiuj partoprenu kaj kundividu!








### *KONCERTO EN LA "CASA DE LA CULTURA JALISCIENSE"*

**Muziko** estas **universala lingvo**, kiu kunigas personojn de la plej **malsamaj kulturoj** kaj devenoj, same kiel en la kazo de **Esperanto.** Tiel ke se ambaŭ renkontiĝas samloke, la momento iĝas la plej altgrada esprimo de **multkultureco;** diverceso kaj unikeco.

Kadre de la 11a Meksika Esperanto Kongreso, **Meksika Esperanto** Federacio, la germana fondaĵo **"Stiftung Mondo"** kaj la Ministerio pri Kulturo de la **Ŝtato de Jalisco** (Ĥalisko) unuigas fortojn por oferti al la ĝenerala publiko specialan kaj nekompareblan koncerton en kiu la etoso iros ekde la **melodiaj notoj** de la piano kaj de la fagotoj ĝis la **sonoj de Rock** en la Esperanta, hispana, franca, japana, angla, rusa, okcitana, pola, inter aliaj lingvoj, unuigante la miksaĵon de pluraj lingvoj kaj distingante la apartecon de la universalaj lingvoj: **"MUZIKO KAJ ESPERANTO"**



Foto 3.Casa de Cultura Jalisciense

Nomo de la evento: "**Du universalaj lingvoj**"

Dato kaj Loko: **17an de septembro, Casa de la Cultura Jalisciense** (Foto 3).

**Adreso:** Av. Constituyentes #21, Sector Juárez, inter Calzada Independencia kaj 16 de Septiembre. Guadalajara, Jalisco, Meksiko. Antaŭ la parko "Agua Azul"

**Horo:** De la 17a ĝis la 20a h.

Partoprenantoj: **José Gabriel** Jiménez Rendón **(pianisto** de la Nacia Lernejo pri Muziko de la UNAM), **Armando** Hernández Tellez (**fagotisto** de la Teatro de "Bellas Artes"), **Ana Lilia** López Díaz (**fagotistino** de la Nacia Lernejo pri Muziko de la

UNAM), **Leonardo** Jáuregui Soto (**kantanto**), **Jean Marc** Leclercq (franca muzikisto, **Rock-pop**), **Les Peatonés** (bando de **Rock "a gusto"**)

**Partoprenu kaj invitu viajn familianojn, amikojn kaj konatulojn!**








## *LIBROSERVO*

Inter pluraj aliaj, en la libroservo de la 11a MEK vi trovos la sekvajn librojn. Profitu! Aĉetu tie materialon sen pagi sendokostojn!




**Materialoj pri la nuna uzado de la akuzativo**

De: Daniel Moirand

Paĝoj: 331

Prezo: 200 meksikaj pesoj.




**Esperanto por lernejaj klasoj 1 / 2**

De: Josias Barboza

Paĝoj: 164


Prezo: 275 meksikaj pesoj.

**Mil unuaj vortoj en Esperanto**

De: Heather Amery

Paĝoj: 63

Prezo: 275 meksikaj pesoj.




**Gramatiko de Esperanto**

De: Miroslav Malovec

Paĝoj: 135

Prezo: 275 meksikaj pesoj.

